Conrad Ferdinand Meyer,

# Paco sur tero

*tradukita de Willy Nüesch*

La paŝtistoj en libero
Lasis gregon, l' anĝelvorton
Portis tra la basan pordon
Al patrino kaj infan'.
Plu kantadis en lontan'
Ĉielgent' en spaco stela,
Plu sonoris la ĉiela
"Paco, paco sur la tero!"

Ekde tiu vort' anĝela
Ho ve, kiom da kruela
Faris la militkolero
En kiras', sur rajdobest'!
Ofte dum kristnaska fest'
Ĥor' spirita kantis time,
Insistpete, plendesprime:
"Paco, paco ... sur la tero!"

Sed eternas kredregulo,
Ke ne ĉiam la feblulo
Iĝos pred' kaj rabkonkero
De aroga murdogest':
Iaspeca justo-est'
En horor' kaj murdo rolas,
Regno sin konstrui volas,
Serĉas pacon sur la tero.

Iom post iom ĝi formos
Sin, oficos sankte, forĝos
Batalilojn sen danĝero,
Flamoglavojn por la rajt'.
Filoj kun forteco-trajt',
Reĝa gento ekburĝonos,
Kies helaj tubjoj sonos:
Paco, paco sur la tero.

...

Conrad Ferdinand Meyer,

# Paco sur la Tero

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kiam la paŝtistoj sian
Gregon lasis kaj la Dian
Vorton portis tie iam
Tra la pordo de kaban'
Al patrino kaj infan',
Kantis plu la anĝelar'
Kun promes' al la homar':
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Kantis tiel l' anĝelar',
Spertis tamen la homar'
Kiom da sufer' de tiam
Pro milito kaj malam'
En la Sankta Nokto jam!
Kantis ili petegante
Kaj mallaŭte akuzante:
"Paco sur la Ter' por ĉiam!"

Estas tamen daŭra kredo,
Ke la malfortul' ne predo
De perforto estu ĉiam.
Batos iam ties horo,
Eĉ en murdo kaj teroro
Da justec' enestas io.
Estos hom-generacio,
Kiu pacon serĉos iam.

Malrapide ĝi formiĝos,
Ĝia tasko plenumiĝos.
Forĝos ĝi armilojn iam,
Kiuj estos sen danĝer',
Kiuj portos al la Ter'
Pacon, kiu ne plu ĉesas,
Kiel l' anĝelar' promesas:
Paco sur la Ter' por ĉiam!

...

Conrad Ferdinand Meyer,

# Friede auf Erden

Da die Hirten ihre Herde
Ließen und des Engels Worte
Trugen durch die niedre Pforte
Zu der Mutter und dem Kind,
Fuhr das himmlische Gesind
Fort im Sternenraum zu singen,
Fuhr der Himmel fort zu klingen:
"Friede, Friede auf der Erde!"

Seit die Engel so geraten,
O wie viele blut'ge Taten
Hat der Streit auf wildem Pferde,
Der geharnischte, vollbracht!
In wie mancher Heil'gen Nacht
Sang der Chor der Geister zagend,
Dringlich flehend, leis' verklagend:
"Friede, Friede ... auf der Erde!"

Doch es ist ein ew'ger Glaube,
Dass der Schwache nicht zum Raube
Jeder frechen Mordgebärde
Werde fallen allezeit:
Etwas wie Gerechtigkeit
Webt und wirkt in Mord und Grauen
Und ein Reich will sich erbauen,
Das den Frieden sucht der Erde.

Mählich wird es sich gestalten,
Seines heil'gen Amtes walten,
Waffen schmieden ohne Fährde,
Flammenschwerter für dae Recht,
Und ein königlich Geschlecht
Wird erblühn mit starken Söhnen,
Dessen helle Tuben dröhnen:
Friede, Friede auf der Erde!

...

*Traduko de la Germana poemo "Friede auf Erden" de* Conrad Ferdinand Meyer *(Konrado Ferdinando Majero, ∗1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-101-274 (2013-08-28 18:38:58)*

*La tradukinto, s-ro Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, tel. 0041-31-302 66 56), donis al mi, Manfred Retzlaff, en 2005-07-11 la skriban permeson pri la publikigo de tiu ĉi poemo en mia retejo "www.poezio.net". La poemo enestas ankaŭ en la libro "Elektitaj poemoj de Conrad Ferdinand Meyer", kiun eldonis s-ro Willy Nüesch. Ĝi estas aĉetebla ĉe li aŭ ĉe la libro-servo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando).*

*Traduko de la Germana poemo "Friede auf Erden" de* Conrad Ferdinand Meyer *(Konrado Ferdinando Majero, ∗1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-12-12.*

*MR-411-1 / Arg-101-206 (2005-08-01 13:06:34)*

*Conrad Ferdinand Meyer estis svisa poeto, verkisto kaj tradukisto, kiu naskiĝis en la svisa urbo Zuriko (Zürich), verkis precipe en la germana lingvo lirikaĵojn kaj romanojn, sed ankaŭ romanojn en la franca lingvo. Pliaj detaloj pri lia vivo troveblas en la interreto interalie en* `http://www.xlibris.de/Autoren/Meyer Meyer-Biographie/Meyer-Biographie-03.htm`*.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Conrad Ferdinand Meyer *(Konrado Ferdinando Majero, ∗1825-10-11 – †1898-11-28).*

*Arg-101-205 (2005-08-01 13:01:25)*